

Martin Rinckart,  
Nun danket alle Gott

Nun danket alle Gott  
mit Herzen, Mund und Händen,  
der große Dinge tut  
an uns und allen Enden,  
der uns von Mutterleib  
und Kindesbeinen an  
unzählig viel zugut  
und noch jetzund getan.

Der ewigreiche Gott  
woll uns bei unserm Leben  
ein immer fröhlich Herz  
und edlen Frieden geben  
und uns in seiner Gnad  
erhalten fort und fort  
und uns aus aller Not  
erlösen hier und dort.

Lob, Ehr und Preis sei Gott,  
dem Vater und dem Sohne  
und dem, der beiden gleich  
im höchsten Himmelsthrono,  
dem dreimal einen Gott,  
wie es ursprünglich war  
und ist und bleiben wird  
jetzund und immerdar.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MARTIN RINCKART (\*1586-04-24 - †1649-12-08), publikigita 1636.*

*Arg-1044-2119 (2014-06-08 10:57:54)*

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas interalie en [http://www.lieder-archiv.de/nun\\_danket\\_alle\\_gott-notenblatt\\_300778.html](http://www.lieder-archiv.de/nun_danket_alle_gott-notenblatt_300778.html). Tie estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Martin\\_Rinckart](http://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Rinckart).*

Martin Rinckart,  
Nun danku ni al Dio

*tradukita de Clarence Bicknell*

Nun danku ni al Dio  
Per mano, voĉo, koro!  
La tuta mondo ĝojas  
Pro lia granda gloro.  
De frua infaneco  
Li nin beninta estas,  
Kaj liaj amdonacoj  
Kun ni ankoraŭ restas.

Li gvidu nin konstante  
Sur tuta vivovojo,  
Benante niajn korojn  
Per paco kaj per ĝojo;  
Li ŝirmu de danĝero,  
Li donu korfavoron,  
Kaj de malbono gardu  
Nin nun kaj ĉiun horon.

Ho, estu niaj voĉoj  
Kun danko nun levataj  
Al Patro, Fil', Spirito,  
Egale adorataj.  
De homoj sur la tero,  
Ĉielaj anĝelaroj,  
Al Dio sonu laŭdo  
Dum la eternaj jaroj.

*Traduko de la Germana poemo "Nun danket alle Gott" de MARTIN RINCKART (\*1586-04-24 - †1649-12-08) en Esperanton de Clarence Bicknell.*

*Arg-1044-2120 (2014-06-08 10:55:18)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence\\_Bicknell](http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell).*